

Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

Jarabono : 60 fkoj

NOVEMBRO - DECEMBRO

1983 - 6

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

KULTURAJ KAJEROJ

1983 NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86000 Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Raporto pri la 39a Internacia Junulara Kongreso en Debrecen kaj la 68a Universala Kongreso en Budapeŝto H. Boyet

Paĝo de la geknaboj A. Childs-Mee

Kreta Kulturo H. Röllinger

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.



KULTURAJ KAJEROJ

deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn tagojn dum la venonta jaro.

ESPERANTO - DOMO

Grésillon, 49150 BAUGE (FRANCIO)

Tel : (41) 89 10 34
ekster la aranĝoj prefere skribu

KULTURAJ ARANĜOJ 1984

PRINTEMPO

Internacia Renkonto de Infanoj

alveno dimanĉon 1-an, foriro sabaton 7-an de Aprilo

— kursoj, redaktado de staĝo-gazeto, distraĵoj
— diskutrondo pri lingvo-instruado.

SOMERO

PRELEGOJ kaj KURSOJ

alveno dimanĉon 1-an de Julio-foriro dimanĉon 22-an de Julio

— prelegoj diverstemaj
— seminario pri rekta metodo de instruado de Esperanto laŭ la Baza Kurso
— kursoj diversnivelaj por internacia ĉeestantaro
— konversacioj
— malkovro de la regiono

Fine de tiu periodo okazos, la 21-an kaj la 22-an matene la

TRIA LOJRA ESPERANTO-RENDEVUO
organizita de L.F. Koop

— studgrupoj por progresantoj, perfektiĝantoj kaj fluaj parolantoj.

KURSOJ

alveno dimanĉon 22-an de Julio-foriro dimanĉon 5-an de Aŭgusto

— kursoj trinivelaj por internacia ĉeestantaro
— konversacioj, artlaboroj.
— malkovro de la regiono

ESPERANTO per SLOJDO

alveno dimanĉon 5-an de Aŭgusto-foriro dimanĉon 19-an de Aŭgusto

— inicia kaj progresiga kursoj per la praktikado de fotoarto, ceramiko, ŝtofmozaiko, kartonprilaborado...
— kurso pri la praktiko de la Esperanto-strukturoj
— vizito de la regiono kaj de artmetiejoj

RENKONTO de BLINDAJ kaj NE-BLINDAJ ESPERANTISTOJ

alveno dimanĉon 19-an de Aŭgusto-foriro dimanĉon 2-an de Septembro

— kultura programo, kursoj, distraĵoj diversaj.

N.B. La staĝo komenciĝas la morgaŭon de la alventago

La revuo KULTURAJ KAJEROJ publikigas la prelegojn prezentitajn en la Esperanto-Domo.

Esperanto tra la Mondo

LASTAJ EĤOJ DE GIGANTA KONGRESO...

— 5.000 (oficialaj) partoprenantoj el 50 landoj, jen la plej okulfrapa cifero rekorda de la lasta universala kongreso en Budapeŝto, urbo kiu meritas vere esti konsiderata kiel la koro de esperanto, se oni konsideras pri la multaj talentaj esperantistoj kaj famaj verkistoj, « steloj » de nia literaturo, kiuj vivis en la hungara ĉefurbo, tra la historio de nia movado.

— La kongreso eble tenis alian rekordon : tiu de la nombro de spektakloj, teatraĵoj, koncertoj, varieteaj vesperoj. Estis malfacile ĉion spekti !

— La hungara poŝta administracio emisiis specialan poŝtmarkon, okaze de la kongreso.

La rezolucioj adoptitaj meritas seriozan konsideron de ĉiuj esperantistoj. Pri la jubileo de esperanto, la koncernata rezolucio, interalie alvokas : « konsiderante, ke la Centjara Jubileo prezentos en la venontaj jaroj nepreterlaseblajn eblecojn por atentigi pri esperanto, alvokas al ĉiuj esperanto-organizaĵoj tra la mondo doni prioritaton al laboroj tiurilataj ».

Teksto pledas por pli justa, pli demokrata lingva ordo : « La kongreso rekomendas al organizaĵoj interesitaj pri komunikado, doni pli da atento al la lingvaj dimensioj de la internacia komunikado kaj al la rolo, kiun esperanto povus ludi... alvokas al organizaĵoj, okupiĝantaj pri lingva edukado kaj aliaj lingvaj demandoj, doni pli da konsidero al la rezultoj de la evoluo de la komunika teknologio kaj al ties implicoj rilate la nunan lingvan ordon en la mondo, cele al ĝia plijustigo kaj plidemokratigo ».

Alia rezolucio invitas la esperantistojn nepre resti en kontakto kun la moderna komunika teknologio por taŭge informi pri la perspektivoj de la aplikado de esperanto en tiu ĉi kampo.

— UEA decidis krei Internacian Jubilean Fondaĵon kaj invitas la tutmondajn esperantistojn kontribui al tiu fondaĵo por sekurigi la sukceson de la Jubileo en 1987.

— Ekde 1984, en la kadro de la Belartaj konkursoj ekfunkcios nova branĉo pri kanto.

— 672 partoprenantoj el 35 landoj sukcesigis la 39e Internacian junularan kongreson en Debrecen kaj diskutis pri la temo : « Informfluo en la nuntempa mondo ».

— La aliĝo de la kuba asocio estis akceptita kaj Ĉina Esperanto-Ligo ricevis la trofeon de la asocio kiu plej bone laboris dum la jaro.

... KAJ UNUAJ INFORMOJ PRI LA UNIVERSALA KONGRESO EN VANCOUVER

Pri la universala kongreso en Vancouver, ni jam anoncis la antaŭkongreson en Montrealo. Oni poste ricevis informojn pri la antaŭ- kaj post- kongresoj kiuj, fakte, estos ekskursoj en Usono. La partoprenantoj povos vidi Nov-Jorko, Bostono, Vaŝingtono, Ĉikago, Seatlo dum la antaŭkongresa ekskurso (7a ĝis la 21a de julio) ; Los Angeles, Phoenix, Las Vegas, Bishop, San Francisco, Monterey, Santa Barbara kaj aliaj dum la postkongresa ekskurso (29a de julio ĝis la 10a de aŭgusto).

Krome, la Tria Tutpacifika Esperanto-kongreso (kun la usona kongreso), okazos en la universitato de Portland (14-19a de julio).

Ni povas ankaŭ aldoni ke dum la ekskursoj en Usono la antaŭkongreso entenos la faman « Disney World » en Florido, la Grandan Lagon (Miĉigano), kaj la « Blankan Domon » de la Prezidento kaj la postkongresa « Disneyland » en Kalifornio ; la Grandan Kanjonon en Arizono kaj Hollywood.

Detaloj haveblaj de Esperanto-Vojaĝservo de ELNA p/a Howard Travel Service, 578, Grand Avenue, Oakland CA 94610, Usono aŭ de UEA mem.

— La Universala Kongreso disvolviĝos en la universitato de Brita Kolumbio, sur marborda tereno ĉe la rando de la urbo Vankuvero. Du grandaj apartementaroj estos la loĝlokoj por ĉiuj kongresanoj.

LA SOMERAJ KURSOJ EN SAN FRANCISKO

En 1984 okazos festo okaze de la 15a datreveno de la trisemajnaj someraj esperanto-kursoj en la ŝtata universitato de San Francisko.

En 1983 venis 65 gestudentoj el Usono, Ĉinio, Japanio, Aŭstralio kaj Kanado. Instruis D-ro Claude Piron kaj S-ro Yoshimi Umeda, nova vic-prezidento de UEA.

En 1984, instruos Dro John Wells, akademiano kaj D-ro Duncan Charters, de la 25a de julio ĝis la 13a de aŭgusto.

Skribi por informoj al Esperanto-Informcentro, 410, Darrell, Hillsborough CA 94010 Usono.

OKAZIS ANKAŬ EN 1983

— SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) havis sian internacian kongreson en Linz (Aŭstrujo) por 185 partoprenantoj el 17 landoj, kun kiel kutime, kamaradeca etoso kaj interesaj programo kaj diskutoj.

— Dum la 10a Internacia kongreso pri Kibernetiko, kiu okazis en Namur, dum aŭgusto, naskiĝis « ĝemelfrata » organizo : « Tutmonda Asocio pri Kibernetiko » (TAK), kies oficiala lingvo estos ĉefe esperanto. Ĝia unua kongreso disvolviĝos en Budapeŝto dum somero de 1985.

Informoj : Instituto pri Kibernetiko, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

TELEKOMUNIKA VORTARO

Aperis angla-esperanta telekomunika vortaro, preparita de C. Bertin. Tiu libreto de 72 paĝoj entenas 1.600 vortojn aŭ esprimojn, kun tre interesaj apendicaj paĝoj por la fakuloj.

Prezo : 30 FF + 20 % por sendkostoj. Mendu ĉe C. Bertin, 60, allée de la Renaudière, 35510 Cesson-Sévigné, Francio.

Raporto pri la 39a Internacia Junulara Kongreso en Debrecen kaj la 68a Universala Kongreso en Budapeŝto

La 39a IJK de TEJO okazis inter la 23a kaj la 30a de Julio en la urbo Debrecen (Hungario), 220 kilometrojn oriente de Budapeŝto. Debrecen, tria urbo de Hungario kun pli ol 200 000 enloĝantoj, havas tre riĉan historion ; ĝi plurfoje rolis kiel landa ĉefurbo kaj fariĝis bastiono de la Reformacio. Nun, ĝi famas pro siaj termakvaj banejoj al kiuj venas malsanuloj el pluraj landoj, pro sia biblioteko kaj siaj universitatoj. Apud ĝi, eten diĝas stepo Hortobägy, la plej granda nacia natura parko en Eŭropo.


Partoprenis ĉirkaŭ 700 gejunuloj el 25 landoj ; tiel Debrecen fariĝis la dua plej sukcesa IJK post tiu, kiu okazis en 1966 en Pecs (jam en Hungario !). La kongresejo estis la tute moderna kulturdomo de la departemento, kiu bedaŭrinde povis akcepti nur tri kvaronojn de la partoprenantaro ! La kongresa temo, « informfluo en la nuntempa mondo », rekte ligiĝis al la nuna Jaro pri Komunikado ; ĝin traktis prelegoj pri amaskomunikado (aŭtonomio kaj manipulado), gazetara strukturo, hungara elektronika industrio, komunikado kaj komputado, televido en la lastaj du jardekoj,... Ankaŭ okazis prelegoj pri multaj aliaj temoj : mondmalsato, plantoprotektado, k.t.p. kaj dum la tuta semajno funkciis ekspozicio pri mikrokomputiloj, kiujn ĉiu povis provi (kondiĉe ke estis libera loko !). Krome, okazis konkurso pri « magia kubo » (gajnita de Lo Jacomo), teatraj programoj, pupteatro, ĥorkantado, hungara vespero, internacia vespero, baneja vespero, projekciado de filmoj kaj tuttaga ekskurso al la nacia parko Hortobägy.

La 68a UK de UEA okazis inter la 30a de julio kaj la 6a de aŭgusto en Budapeŝto, ĉefurbo de Hungario, kiu jam dufoje gastigis la Universalan Kongreson. Jam pli ol unu jarcenton unuiĝis la du urboj Buda kaj Pest ; nuntempe, kun pli ol du milionoj da enloĝantoj, Budapeŝto forgesis la duan mondmiliton kaj ĝiajn detruaĵojn ; rekonstruiĝis ne nur la pontoj kaj la monumentoj pri la la longa historio de la urbo, sed ankaŭ la industrio (unu kvarono de la landa produktado). Por la turisto, krom Danubo kaj ĝiaj ok pontoj, aparte interesaj estas multaj palacoj kaj preĝejoj, ne forgesante ĉiujn nomumentojn pri la miljara ekzisto de la lando.

Aliĝis pli ol 5000 personoj, el ĉirkaŭ 50 landoj absoluta rekordo por Universala Kongreso. La disvolviĝo de la kongreso nepre rimarkiĝis de la Budapeŝtanoj pro la flagoj kaj la dulingvaj panelegoj, kiuj bonvenigis la kongresanojn. La sporta halo disponigis sufiĉan lokon por ĉiuj ; ĝi eĉ estis tro granda, kiam oni serĉis difinitan salonon : oni ofte renkontis homojn, kiuj spite la sagojn perdiĝis en la labirinto, senespere serĉante la elirejon aŭ la ĉambron de la venonta prelego ! Kiel kutime, gravaj programeroj estis la prelegoj de Internacia Kongresa Universitato kaj tiuj pri la kongresa temo (ĉi jare « sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado ») ; jam tradicia estis la Esperantologia Konferenco kaj duajare okazis la Tago de la Lernejo. Tute nova okazaĵo estis la Internaciaj Ekzamenoj de UEA, kiuj arigis dudekon da kandidatoj, kvankam la ekzamenoj samtempis kun la ekskursotago. Ankaŭ havis multan sukceson la du kvizoj : unu pri Hungario kaj la alia pri la historio de UEA. Kompreneble, oni povis ĉeesti kunvenojn de multaj fakaj asocioj, de la Akademio, de la Komitato... Denove ĉi jare, « ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'profeto » estis la ĉefteatraĵo kaj okazis sen konkurenco en la kongresejo ; male, la aliaj teatraĵoj (« Epifanio » de Shakespeare, « Sen eliro » de Sartre, ...) okazis en alia loko dum aliaj interesaj programeroj ; espereblas, ke tia flatado al loka gravulo ne ripetiĝos en venontaj UKoj. Du esperantlingvaj prezentadoj okazis en la planetario ; multaj ekskursoj ebligis ekkoni diversajn aspektojn de la urbo kaj de la lando.

Ĉefa trajto de ambaŭ kongresoj estis la svarmo de la homoj ; tiel granda nombro da partoprenantoj malhelpas la kontaktojn kaj kaŭzas problemojn (ekz. longegaj vicoj), kiujn la respondeculoj malfacile povas solvi, eĉ kun granda sindonemo. La venonta IJK okazos en Swanwick (Britio) kaj la venonta UK en Vankuvero (Kanado) ; ambaŭ havos la grandegan avantaĝon, ke ĉio troviĝos en la sama loko : ne necesos veturi dum longa tempo por atingi la kongresejon kaj oni povos ĉeesti la programojn ĝis la fino, ne zorgante pri la nefunkcio de urbaĵ trafikiloj post la 23a horo !


H. BOYET.



Matias-preĝejo



Kulturcentro de Debrecen (kongresejo de la Internacia Junulara Kongreso)



Sporthalo de Budapest (kongresejo de la Universala Kongreso)

Paĝo de la geknaboj

ĈU VI ESTAS KOLEKTANTO ?

Ĉu vi legis la rakonton « Kolektanto de ĉielarkoj » de s-ro Tibor Sekelj ? Se ne, sendube ĝin vi legos iam.

Ĉu VI kolektas ĉielarkojn ? Ne ? nek mi. Ĉu vi kolektas ion ajn ?


Ĉu mi kolektas ion ? Certe ! Elefantojn !

Nur malgrandajn, kompreneble !

Estas grego da elefantoj sur mia breto, kaj kelkaj libroj staras inter libro-apogiloj elefantformaj. Kaj, sur brakseĝo, sidas kvar (tri estas ludiloj, la kvara, kuŝeno).

Sur la breto estas dek naŭ, plus la libro-apogiloj. La plej granda besto malhele griza, alta je 16 cm. La plej malgranda estas arĝentizita. Ĝi estas alta je nur 2 3/4 cm. Alia estas kandelo, kaj du blankaj etuloj fakte estas sal- kaj piprujoj.

Onklino JEAN
el Aŭstralio



La granda griza elefanto. **La elefant - kandelo.** **La sal- kaj piprujoj.** **La arĝentita etulo.**

KRETA KULTURO

PRIMARA CIVILIZO EN EŬROPO

Antaŭrimarko : Ankaŭ ĉijare s-ano Hugo Röllinger, Bad-Kissingen, FRG, prezentis dum la Kultura Periodo 1983 diapozitivajn prelegojn diverstemajn, inter ili la ĉi-supre titolitan. Jen ekstrakto al ni disponigita, adaptigita por legado sendiapozitiva.

Antaŭ kelkaj jaroj mi estis sur la insulo Kreto. Tie mi konstatis konsiderindan fakton, nome : la palaco en Knossos, konstruita antaŭ 3500 jaroj, ofertas minimume kvar mondrekordojn :

1-e la plej antikvan pavimitan straton en Eŭropo,
2-e la plej antikvan teatron,
3-e la plej antikvan tribunalan seĝon,
4-e la unuan fluakvan necesejon.

Mi invitas vin sekvi aliajn pliajn personajn meditojn kaj impresojn pri tiu-ĉi konstato. Longe antaŭ ol Grekujo ĵetis lumon en nian historion, la Minoa Kreta Epoko decide influis la kulturon de l'Okcidento.

Homer, la blinda mitologia helena historia poeto vivinta en la 8-a jc. a.K., raportas al ni en sia verko « Odisado » : « Ekzistas lando enmeze de la brilanta maro, kun la nomo Kreto... El inter ĝiaj urboj la plej eminenta estas Knossos, kie regis Minos, li, kiu havis ligon al Zeŭso... ». Jen do citaĵo de Homer, la mistera kaj mita poeto pri la Troja Milito. Nu efektive, jarcentoj antaŭ Homer, pli precize dum la 2-a jarmilo antaŭ Kristo, ĉirkaŭ la tereno de l'Egea maro, evoluiĝis plej talentaj kaj komplikaj admirindaj kulturaj strukturoj. Unu el ili estiĝis sur la greka kontinento, la alia sur la insulo Kreto. Estis tiu-ĉi epoko en kiu estiĝis la unua civilizo en Eŭropo.

La plej antikva origino kaj praa fonto estis la 50 km. larĝa montara insulo Kreto, 270 km. longa, enmeze de l'Egea Maro. Ĉi-tie ĉirkaŭ 2000 jarojn antaŭ Kristo, esploremaj maristoj konstruis grandajn palacojn, kreis elitajn artaĵojn kaj marveturis per ampleksa ŝiparo la Orientan Mediteraneon de Malgrand-Azio ĝis Sicilio. Ĉi tiu primara kulturo en ĝia flora epoko ja ankoraŭ estis en la obskura ombro de l'konscia pasinteco ; prosperonta Egiptujo ankoraŭ ne estis leviĝinta en la eraon de grandioza evoluo kaj etendiĝo, kaj la homoj en la teritorio de l'tiama Eŭropo estis elpaŝantaj dum jarcentoj el la primitiveco de l'Neolitiko. Dum konsiderinda epoko la homoj sur Kreto regis la teritorion ĉirkaŭ la Egea Maro kaj ili transdonis al la tiama Greklando siajn artlertecon kaj tradicion, inkluzive siajn legendojn pri reĝo Minos, pri Tezeo, la reĝo de Ateno, kiu mortigis la Minotaŭron en la labirinto. « Minos », raportas Herodoto, la plej eminenta greka historiisto, « Minos regis la maron ». Kaj Diodoro raportas al ni « Tiu Minos estis la unua greko, kiu kreis maran potencon kaj kiu fariĝis suverena estro de l'maro ». Tamen historio kaj legendo pri Kreto intermiksiĝas historie kaj mitologie.

Laŭ la greka mitologio, Zeŭso, en korpa formo de blanka virbovo, forrabis la mirinde belan fenican princinon Eŭropa kaj naĝis kune kun ŝi tra la maro al Kreto. Naskiĝis tri filoj ; unu el ili estis Minos.

Minos feliĉe kaj suverene vivis sur Kreto. Sed iutage li ofendis Posidonon, la Dion de la Maroj. Pro venĝo Posidono plenigis la animon de Pasifaa, la edzino de Minos, per afekta ama pasio al la sankta virbovo. La rezulta ido el ĉi-tiu nenatura kuniĝo estis la Minotaŭro, monstro kun korpo de homo kaj kapo de virbovo, kiun Minos arestis en labirinto de l'kreta palaco.

Nu rilate la sciencan kaj arkeologian esploron de la kreta historia kulturo kaj civilizo, cetere la nuna jaro 1983 estas kvazaŭ jubilea jaro ; ĉar ĝuste nun estas pasintaj precize 100 jaroj depost kiam, en 1883, estis aranĝita unua kolektaro de trovitaĵoj el la historiaj terenoj sur Kreto. Nur 5 jarojn antaŭe estis malkovrita la Palaco de Knossos. Tamen, ĝis la fino de l'pasinta jarcento, la plej antikva kulturo de Kreto restis preskaŭ nekonata, ĝis kiam, en 1900, la angla arkeologo Sir Arthur Evans, en forta iniciativo aranĝis grandstile fosajn esploradojn. La unusolaj atestaĵoj pri ĉi-tiu unika kulturhistoria epoko de l'homa progreso estas la ruinoj sur Kreto kaj la trovitaĵoj en kaj sub ili. Feliĉe preskaŭ ĉiuj objektoj trovitaj iam ajn restis sur Kreto kaj ne disiĝis en diversajn muzeojn de la mondo. Pro tio la kreta Muzeo en Heraklion estas vera trezorejo ; tie prezentas sin en diversaj salonegoj, bonorde, la kretaj trezoroj, kiuj reprezentas ankaŭ la unuan ĉapitron de la helena historio, kiu ja estas la plej grava, influriĉa kaj signifoplena por nia tuta okcidenta kultur-nivelo.

Speciale rimarkinde kaj karakterize estas ke dum la tuta kreta historio mankas ĉiaj fortikaĵoj kaj, evidente, ĉiaj militaj rivalecoj. En ĉiuj kulturoj estas ja ĉefe la arkitekturo, kiu plej bone reprezentas la specifajn kulturajn karakterizaĵojn. En la kreta minoa kulturo, dum ĝia kulmina evolua fazo ĉirkaŭ 1400 jaroj antaŭ Kristo, estis konsekvence la grandiozaj palacoj, kiuj reprezentis la kulturajn centrojn. Ili, la riĉaj palacoj, estis la fontoj el kiuj originis la multfacetaj aktivecoj kaj kreaĵoj, kiuj elradiis trans la insulon kaj, plue en la medion de l'Maro Egea. Pli detale dirite, esence estas tri periodoj, tri fazoj, kiuj karakterizas la historian evoluon de la kreta kulturo :

1 — **la antaŭpalaca epoko,** kiu komenciĝis antaŭ ĉirkaŭ 4500 jaroj kaj daŭris ĝis ĉirkaŭ 2000 jaroj antaŭ Kristo. Tiam en la komenco, do ankoraŭ en la ŝtona epoko, en la neolitiko, aro da marveturantaj invadistoj de ankoraŭ nekonata deveno, alportis novajn konojn kaj sangon, kaj kunportis la kupron. Gravaj impulsoj. Finiĝis la neolitiko, komenciĝis la kupra kaj bronza epokoj.

2 — **la antikva palaca epoko** de 2000j. ĝis 1700j. a.K. Estas la epoko de la grandaj palacoj : Knossos, Festos, Malia. Tio signifas, ke la potenco koncentriĝas en la manoj de suverenaj regantoj. Urboj estiĝis. Ĉaroj sur radoj estis uzataj. Prosperis la arto de ceramiko. Potistoj kreis elegantajn vazojn polikromiajn en gustoplenaj strukturoj. Kaj unuafoje la skribo estiĝis en la plej antikva formo, la hieroglifoj. Sed la feliĉo ne estis konstanta dum ĉi-tiu tri-jarcenta prosperado ; dufoje tertremoj parte detruis la konstruaĵojn kaj tria estis la plej terura. Estis ĉirkaŭ la jaro 1700 a.K. Estas rimarkinde, ja mirige, ke evidente, laŭ la arkeologiaj esploroj, post la detruo de la palacoj ne sekvis stagnado ne sekvis interrompo de la kultura aktiveco. Tute male, sekvis

3 — **la nova palaca epoko,** ĉirkaŭ 1700 a.K., kiu kondukis Kreton en novan, eĉ pli gloran, eraon, kiu daŭris ĉirkaŭ 300 jarojn. Sur la ruinaj fundamentoj de la tri ĉefaj palacoj estiĝis novaj konstruaĵoj pli luksaj kaj grandaj ol antaŭe, estiĝis nova palaco Zakros, estiĝis novaj urboj, riĉaj vilaoj. Antaŭ la tertrema katastrofo, kiu kaŭzis la finon de la Antikva Palaca Epoko, la politika kaj kultura ekvilibroj en Kreto estis dividitaj inter tri ĝis kvar plej gravaj palacoj ; en la Nova Epoko, la palaco en Knossos fariĝis la nekontestebla centro de l'potenco. Sur la etenda areaĵo de l'deklivoj super la valo de l'rivero Kajratos ankoraŭ nuntempe estas difineblaj ĉirkaŭ 800 ĉambroj kaj salonoj ; iam laŭdire estis pli ol 1300 en kvar etaĝoj. Ĉi-tiu palaco, situita en unu el la plej favoraj kaj plej fruktodonaj teritorioj estis unu el la plej eksterordinaraj konstruaĵoj el ĉiuj epokoj konstruita

sur fundamentoj aĝaj pli ol 4000 jarojn ; plurfoje ĝi estis transformita, plivastigita kaj plibeligita fare de sukcesaj regantoj, laŭ fantazio aŭ neceseco pro domaĝoj post tertremoj. Tiel, ne planita kiel arkitektura tutajo, sen simetrio aŭ fiksaj reguloj, la palaco evoluis al ŝajne neorda komplikaĵo konsistanta el salonoj, koridoroj, kolonadoj. Ne mirige, ke la Grekoj, 1000 jarojn post la detruiĝo, opiniis la komplikan ruinaron la legenda « labirinto » de la jam por ili antikva sagao pri la Minotaŭro, la virbovokapa monstro. Sed kontraste al tio la palaco estis aera kaj komforta, ornamita ĉie per belege pentrumitaj kolonoj, freskoj kaj dekoraj fasadoj. La amplekso de la palaco estas 22000 kv.m. Ronde de ĝi la prosperanta urbo kun la haveno, la tiam plej granda en Eŭropo, havis 100 000 enloĝantojn. Speciale interese estas en Knossos rekonstruita parto okcidenta de la palaco, vidata de el meza korto (foto 1). Sanktejo en la centro estas kronita de vico da duoblaj kornoj virbovaj. La virbovo, kiel la plej valora besto estis inda esti oferata al la « Diino por Tero kaj Fekundeco ». Tial virbovaj kornoj ornamis, kiel simboloj, la palacojn. Larĝa ŝtuparo kondukas al la dua etaĝo en la festsalonojn. La historiistoj disputis pri tio, ĉu la elfosinta arkeologo Arturo Evans ne troigis en la « renovigo » de la palaco, ekzemple rekonstruinte la kolonojn en intensa ruĝo. Sed fakte sen tio la impresoj ne estus tiom vivaj por ni homoj de l'nuntempo. Abundas la formoj kaj mezuroj de « vazoj », pli bone de argilaj ujoj destinitaj por provizaĵoj, vazoj parte transportitaj eksteren el la magazenoj de la palaco fare de la arkeologoj, ujoj kiuj parte entenis restojn de diversaj nutraĵoj, speciale de oliva oleo, de mielo, kaj aliaj. La Minoa ŝiparo regis la marojn. Minoaj komercaj ŝipoj velveturis de Malgrandazio ĝis Sicilio, de la Dardaneloj ĝis la Nilo, por eksporti ceramikon kaj bronzaĵojn, vinon kaj olivoleon, kaj reveni kun stano, eburo kaj aliaj fremdlandaj produktoj.

En unu el la salonoj de l'reĝino sur murpentrajo ludsaltas fiŝoj kaj delfenoj (foto 2). Moderne aspektantaj




Foto 1 **Palaco Knossos, rekonstruita parto** (foto Röllinger)




Foto 2 **Palaco Knossos, fresko pri delfenoj** (foto Röllinger)

pentraĵoj kun bendformaj ornamaj elementoj en la salonoj impresas pro sia rava brilo kaj ĝojo pri la vivo, pro siaj sentoj pri naturecaj moviĝoj en la pentra arto. Ĉie en la Minoa kultura medio ties gusto decidis pri la modo kaj la kutimoj. En la forma arto la Minoanoj restis fidelaj al siaj tipaj konceptoj ; neniel ili provis imiti siajn najbarojn, la Egiptojn, do ili ne kreis monumentojn. Des pli la Minoaj artistoj laŭ-formis la homan korpon per statuetoj en fajenco kaj bronzo. Bona ekzemplo pri tio estas la « Serpenta Diino » el fajenco en la sanktejo en Knossos : eleganta Minoa robo, talio de vespo, etenditaj brakoj kun serpentoj kaj la tipe prezentitaj nudaj mamoj, kiel simboloj de l'fekundeco. Ĉefa karakterizaĵo de l'Minoina vestaĵo estas ĝistera pufiĝa jupo kombinita per talion-montra, et-manika tute aperta korseto. Pri tiu-ĉi modo ekzistas modernaj rekonstruaj pentraĵoj, kiuj montras, ke altrangaj minoaj sinjorinoj ornamis siajn robojn per elegantaj ringoj, braceletoj, kolĉenoj, orelaj ringoj k.a. ĉarmaj galanterioj, kiel ekzemple oraj fiŝetoj aŭ ranoj.

La strato al la palaco Knossos kondukis super masiva ŝtona viadukto, kiu transpontas la riveron Vlychia per naŭ korbelaj arkoj. Sur tiu-ĉi ĉefstrato pulsis la tuta reciproka insula trafiko, kiu konstante moviĝis inter la nordaj kaj sudaj havenoj, la nordaj, kiuj komercis kun negocistoj ĉe la egea marbordo, la sudaj kun kontaktoj al Afriko. Ĉe flanko de l'palaco, kiu situis vid-al-vide de l'kruta valo, la strato forke disiĝis en tri suprenirejojn. La dekstra el ili kondukis al la ŝtupoj de l'kolona halo de la Palaco, impresoplene ornamita kaj apogita de vicoj da impone ruĝaj kolonoj en Minoa stilo. Nur de tieĉi oni atingis la oficialan enirejon, uzatan fare de enloĝantoj de l'Palaco, de registaraj oficistoj kaj de ambasadoroj fremdlandaj. La meza suprenirejo kondukis al la okcidenta korto, kie komercaĵoj kaj provizaĵoj estis akceptitaj kaj kie civitanoj renkontiĝis kun palacaj personoj. La maldekstra alirejo kondukis norden al la havenurbo ĉe la Egea Maro, 4 km. distance. Malantaŭ cipresoj kaj olivarboj situis la urbo Knossos. Artecaj bildaj rekonstruoj montras al ni nuntempuloj la vivmanieron en la palacoj. Ekzemple en la loĝejoj de l'Reĝino konversacias atendantaj kortegaj sinjorinoj, ŝpinantaj kaj ludantaj, dum sia Reĝina Moŝto estas frizata kaj manflegata, sidante nuda. La ĉambroj estis lumigitaj kaj aerumigitaj pere de ŝaktoj kiuj estas karakterizaj por la Minoa arkitekturo (foto 3). Freskoj kun maraj motivoj ornamis la murojn. En la reĝaj magazenoj laboristoj transportas ledajn sakojn, plenigitajn per oliva oleo kaj vino, en provizejojn. Dume skribisto registras la kvantojn sur argilan tabuleton. En la mezo viro deponas lignan kesteton kun valoraĵoj en subplankan kavaĵon, kiu poste estos fermita per pezaj ŝtonaj platoj.

En la Nova Palaco Epoko, ĉ 1 650 a.K., la minoaj artistoj kreis freskojn, kiuj kombinis bareliefon kaj pentrarton. Eble ili estis influitaj de egiptaj modeloj. En rekonstruita koridoro videbliĝas stukreliefo kun la kulta virbovo. En apuda halo la t.n. procesia fresko. Eĉ pli ravaj freskoj en la palaco de Knossos mem : eble la plej konata kreta fresko estas la t.n. « Eta Parizanino », tiel nomata pro siaj ruĝaj lipoj kaj siaj ĉarmaj bukloj, evidente fragmento de mitologia diino eble akceptanta oferaĵon. Alia fresko montras fragmenton de l't.n. « Blua Birdo », rava en la formoj kaj intensaj koloroj. Interesaj estas la stilizitaj folioj de hedero kaj safrano. Plue freska reliefo de l't.n. « Libia Princo » aŭ, laŭ fakuloj, de « Pastra Reĝo ». La gracila juna figuro surhavas la minoan lumban zonon kaj sur la kapo mirindan kronon el lilioj kaj plumoj de pavo. En la dekstra mano li tenis aŭ tiris sanktan beston, sfinkson aŭ grifonon, tiun fabelan miks-estaĵon el aglo, leono kaj serpento.

Novajn kulminojn atingis la Minoaj artmetioj. Trinkpokalo en formo de virbova kapo el la Palaco de Knossos estas aparte admirinda (foto 4). Estis ofera ujo por



Foto 3

Palaco Knossos, halo de la blazonŝildoj (foto Röllinger)




Foto 4

Palaco Knossos, virbova ofera vazo el steatito

(foto Röllinger)

uzado en ritoj. Interne la kapo estas kava ; fluidaj oferaĵoj eliĝis el la buŝo. Materialo : nigra steatito. Brilantaj okuloj el roko-kristalo ; la iriso, mastra marketaĵo el jaspo kaj blanka konko. Entute ekzemplo pri ekstrema arta lerteco. La eksteraĵo estas delikate precize modlita, speciale la bukloj de l'frunto inter la kornoj. La okuloj el juvelŝtonoj kaŭzas la efekton de kolera ekvido.

Mond-fame konata estas la « Disko de Festos ». Ambaŭflanke de la argila disko estas enstampitaj per matrico 45 diversaj signoj, entute 61. Diametro 16 cm... Aĝo de l'disko ĉ 3650 jaroj. Jaro de l'eltrovo en la Palaco de Festos : 1908. Depost tiam la disko gardas sian sekreton, por esti legata ĝi atendas sian Sherlok Holmes aŭ pli bone sian Champollion, kiu, kiel konate, deĉifris laŭ la « Ŝtono de Rosette » la egiptajn hieroglifojn. Jenaj kretaj hieroglifoj sur la disko estas tute klaraj, kiel kapoj, viraj kaj virinaj figuroj, fiŝoj, birdoj. Kiel kvazaŭa bilda rakonto ili kontinuiĝas korekte spirale, de ekstere internen, aŭ renverse, laŭvole. Estas rave atente rigardi unuopajn simbolojn : etan viron rapideme paŝantan aŭ etan kapon kun ĉapa plumaro aŭ ĉu estas frizaĵo ? — longbuŝan fiŝon, sidantajn kaj fulgantajn birdojn. Vere, unu el la plej interesaj trezoroj de l'muzeo de Heraklion. Kiu solvos la enigmon de l' « Disko de Festos » ?

Ofte, post mia vizito al la unika muzeo de Heraklion sur Kreto, mi rememoras la etan nigran steatitan vazon, kiun la katalogo de la muzeo nomas « la plej grava eksponaĵo », la t.n. « Falĉilista vazo » aŭ « Rikolta Vazo ». En la Minoa arto estas rimarkinda antaŭ ĉio la natureco de la figuraj scenoj kaj la eksterordinare bone prezentitaj vivanteco kaj moviĝoj en ili. Eĉ ne la belega Parthenon friso de l'klasika helena skulptisto Phidias komparita kun tiu vazo sur Kreto elspiras similan realismon. Natura bonhumoro ronde ĉirkaŭ la eta vazo : procesias gaja aro da kamparanoj, kiuj hejmen venas de la rikolto kun forkoj kaj falĉiloj sur la ŝultroj. Inspirite de tiu-ĉi originala artaĵo moderna pentristo rekonstruis bildan scenon, realisme, surbaze de la « vazaj » historiaj faktoj. Oni imagu do la rondan reliefaĵon ĉirkaŭ la vazo laŭlonge etendita kaj pentre rekonstruita. Jen : procesio de kamparanoj en la granda meza korto de l'Minoa Palaco. Ĝi estas la kulmino en rikolta dankfesto honore al la naturdiino, je l'fino de produktiga labora sezono. Kiel avangardo paŝas kvar kantistoj kaj muzikanto petole kapriolanta ; li klakas per tintilo, egiptdevena instrumento. Malantaŭ li dance paŝas la kamparistoj, gaje ridantaj ; ili svingas, simbol-triumfe, grenajn faskojn. Gvidataj ili estas de nobela grundposedanto, griznara viro, kiu estas vestita per leda mantelo, garnita per franĝoj kaj ornamita per skvama dekoro. Unu el la partoprenantoj faletis, eble pro tro da vino, alia estas petole portata sur la ŝultroj de kamarado. De sur la brile pentrumitaj balkonoj kaj de l'kolona galerio de l'okcidenta fasado de l'korto, la personaro de l'palaco observas la gaje bruantan festadon. En la mezo de la fasado, tuj malantaŭ la falinta laboristo, estas malgranda kolona altaro ; ĝi estas dediĉita al patrona diino kaj estas ornamita per blankaj konsekritaj kornoj. Dekstre ŝtuparejo kaj enireja halo kondukas al la oficaj kaj administraj partoj de la palaco.

Alia ujo el steatito, same trovita en la Palaco Hagia Triada, estas simile impona rilate la artecan prezenton de vivantaj moviĝoj : kvar reliefaj bendoj karakterizas konusforman vazon. En la plej supra bendo luktas atletoj : vivo kaj energio ; fortikaj staturoj. En la dua bendo virbovaj ludoj. Fluganta galopo ; unu akrobato jus ŝvebas inter la kornoj. En la tria bendo, bokssportistoj en diversaj pozoj ; ili surhavas gantojn kaj konkojn por gardi la kapojn. En la kvara, boksbatalo de junuloj. Ĉiuj scenoj estas realisme lerte cizelitaj.

Unika ŝtona sarkofago el la sama Palaco Hagia Triada montras mortokultan riton. Ĉi-tiu trovitaĵo estas unu el la plej informoriĉaj fontoj pri la religiaj kutimoj en la Minoa Kulturo. Kultaj scenoj sur ĉiuj kvar flankoj Sur unu el ili, dekstre, figuro, kiu ŝajnas esti aperinta el la tero, antaŭ maŭzoleo. Oni interpretas, ke al ĉi-tiu evidente suverena portinto estas dediĉitaj la kultaj ritoj fare de la aliaj. Al li paŝas tri viroj vestitaj en feloj ; la plej antaŭa prezentas boaton (ĉu por Hadeso kaj La Styx, laŭ la mitologio de la plej postaj Helenoj ?) ; la du aliaj portas po unu bovidon. Sendube temas pri konsekritaj donacoj al la distingita mortinto. Tute maldekstre « pastrino » same vestita per felo, verŝas oferan sangon de virbovo en amforon, kiu staras inter du pilonoj kun duoblaj minoaj toporoj. Temas efektive pri ofera sango virbova, ĉar alia flanko de la sarkofago montras la oferadon de virbovo, kiu estas katenita per ruĝaj bendoj al altaro, dum lia sango fluas en basenon. Ĉi-tiu evidenta sankta ago de l'elverŝado de l'sango estas akompanata de l'sonado de sepkorda liro.

Alia grava palaco estis Malia. Multajn kvartalojn la arkeologoj malkrovris : bone konstruitajn stratojn, konstruaĵojn kun difinitaj celoj kaj foiran placon. La palaco de Malia formis la centron de etendita urbo. Depost 70 jaroj francaj arkeologoj fosas en la palaco de Malia, kiun tertremo detruis, kiel la aliajn palacojn ĉirkaŭ 1450 antaŭ Kristo.

Kontraste al la egiptoj kaj la sumeranoj, la Kretoj ne konstruis templojn por siaj imagaj dioj. Anstataŭe ili ornamis siajn loĝejojn per etaj sanktejoj. La plej impreso-plenaj lokoj de la Minoa religio estis naturaj kavernoj en la profundecoj de la kalkŝtonaj deklivoj, speciale la sankta « Kaverno de Ejlejtia », honore al la Diino de Akuŝo estis relikvejo por pilgrimoj. Du stalagmitoj origine estis idoloj honore al la « Patrina Diino » kaj al ŝia infano. La adorantoj estis konstruintaj mureton ĉirkaŭ la du naturaj kolonoj por prezenti siajn oferaĵojn. Sur moderna rekonstrua bildo, kredanto metas statueton sur kornicon dum gejunuloj staras en pia respekto. Pluraj statuetoj estas videblaj inter la stalagmitaj fendoj. La ĉefdiino de l'antikva kreta religio evidente estis Diino vestita en la eleganta Minoa modo. Estis trovita « Diino de l'Serpentoj », idolo el fajenco. Sur la etenditaj brakoj rampas alten serpentoj, kiuj eĉ volviĝas ĉirkaŭ tute la korpo kaj laŭlonge malsupren de sur la kolo. Ŝi surhavas longan robon kun antaŭtuko kaj eĉ sur tiu estas ornamaĵo serpentuma. Longa virta robo, sed la brusto estas nekovrita, prezentita tipe laŭ Minoa modo. Ĉar serpentoj en antikvaj religioj aperas, kiel simbolo de l'morto kaj kiel protektantoj de l'domo kaj de l'familio, la diino de l'Minoa kredo povis esti aŭ regantino de l'hadeso aŭ gardantino de l'hejmo. Aliafoje kretaj diinoj estis prezentitaj en ligo kun birdoj kaj arboj.

La plej grava ŝipara bazo dum la unuopaj palacaj epokoj estis Kata Zakros ĉe la orienta marbordo de l'Kreto, do vid-al-vide de Sirio kaj Fenicio ; prosperis interŝanĝa komercado, vigla eksporto de Minoaj metiaĵoj, importo de kupro kaj de bronzo, de eburo, de oro, de raraj mineraloj. Ĉirkaŭ 250 salonoj ampleksis la palaco. Certaj indikoj pruvas, ke ĝia definitiva detruiĝo okazis tiom abrupte, ke ne restis tempo al la homoj sin iel adaptiĝi al la pereo. Unike valorajn trovitaĵojn de ĉi-tie gardas la muzeo en Heraklion, inter ili mirindan vazon kun ora ornama kolringo. Tiu-ĉi gracila karafo estas rekunmetita el centoj da romperoj fare de specialistoj en la muzeo, kaj nun ĝi atestas la delikatan senton pri formoj kaj gusto de la Minoa artmetio antaŭ 3 500 jaroj.

La absoluta kulmino de l'Minoa oraĵa artmetio estas mirinda objekto kiu estis trovita en 1945 en la reĝa tombejo ĉe la palaco Malia. Enigme kaj feliĉe tomborabistoj dum 3 500 jaroj estis ĝin pretervidintaj. Estas mirinda ĉefparto de kola ĉeno ; la aldonaĵo konsistas el du abeloj kiuj suĉas de guteto de mielo. Dua guteto de mielo pendas en ĉeleto super iliaj kapoj. Sub la korpoj miniatura miela ĉelaro. De la flugiloj kaj de ambaŭ korpopintoj pendas tri disketoj fiksitaj pere de or-drataj spiraletoj. Sufiĉas priatenti la eminente perfektan prilaboradon de tiu-ĉi ornamaĵo, la nesupereblan klarecon de la formoj kaj la majstran kompletigon de ĝiaj partoj, por esti ravita de tia kompozicio en oro. Tutcerte estas ima-

geble, ke tiu ĉarma kreaĵo estas farita de moderna nuntempa oraĵisto, ne de Minoa, antaŭ 3 500 jaroj !

Tute alia speco de tiaj artaĵoj estas tiuj en bronzo fanditaj. Estas tekniko, kiu estiĝis en iom pli posta fazo de l'evoluo, en la 8-a aŭ 7-a jarcento antaŭ Kristo. Aparte perfekta granda medalo, bronzofandaĵo, estis trovita en la Ida-kaverno ĉe Knossos. Ĝi montras Zeŭson tretantan leonon kaj dispecigantan alian. Maldesktre kaj dekstre flugilumitaj asiriaj demonoj.

Ni revenu lastfoje al la freskoj en la palaco de Knossos. Ili vivigas la palacon, ili elspiras vivon de ĝojo, ĉarmo kaj feliĉo. La plej fama el ĉiuj freskoj estas tiu pri virbova ludo (foto 5). Ni jam parolis pri la rolo de l'virbovo en la kretaj historio kaj arto. Kornoj estis sanktaj simboloj de l' « Patrina Diino » ; virbovoj kaj virbovaj ludoj reprezentis konsiderindan parton de la religiaj kaj vivaj kutimoj Sur Kreto ĉi-tiuj bataloj havis pli la karakteron de rita sporto ol de sangoavida atako kun kurĉaso kaj mortigo de virbovo. Entuziasmige, kiel la virbovo, impetanta besto, sin ĵetas atake antaŭen en plena furioza ekpuŝo, dum en la sama momento la akrobato ekkaptas liajn mallevitajn kornojn por esti altenĵetata fare de la lanĉanta kapo virbova. En ereto da sekundo en la ĝusta momento, li ekdeŝiras sin de la kornoj, tuŝas en salto la dorson de l'besto kaj ĵetas sin teren antaŭ ol la virbovo kapablis sin turni por denove ataki. Por moderna pentristo ankaŭ ĉi-tiu fresko estis modelo por viva natureca pentraĵo. Entute do temas sur Kreto pri kulturo ĝenerale ne multe konata, pri kulturo riĉa, multfaceta, abunde aspekta, temas pri la « prakulturo eŭropa « pri kiu ni Eŭropanoj apenaŭ konscias, sed kiu tamen meritas, ke ĝi, kiel tia, en alta grado estu historie aprezata.

Hugo Röllinger, Bad Kissingen.




Foto 5 Palaco Knossos, fresko pri virbova sportludado (foto Röllinger)

BELAN DANKON

« Refoja plaĉas ripetado », fama antikvulo diris. Eĉ trifoja, ĉu ne ? kiam temas pri valoraĵoj, kies sukon kaj enhavon sciavida aŭskultanto plenprofiti ne povas per unu fojo.

Ĉu mi permesu al mi personan anekdoton ? Antaŭ tri jaroj mi surloke ĝuegis la ampleksan prelegociklon de S-ro Röllinger pri influo de la islama kulturo en Okcidento. Petite de multnombraj « Grésillon-anoj », li afable ĝin redonis dum la sekvinta jaro. Bedaŭrinde tiam mi estis en Parizo. Dank'al dukaseda registraĵo fare de amikino, mi ree travivis la aferon -kvankam la lumbildoj mankis- kaj jen ĉi-jare mi havas la bonŝancon, ke alia samideano pruntedonas al mi kasedojn de la triafoje travivonta mirindaĵo... Kaj surloke por nuraj kvar tagoj jen mi -kvazaŭ fluge- trafas novan ciklon pri la unua ekspedicio al la Norda Poluso.

Per kelke da linioj mi ŝatus mianome -kaj nome de multaj aliaj- esprimi belan dankon al S-ro Röllinger kaj ankaŭ klarigi, kial la « Grésillon-anoj » tiom dankŝuldas al li.

S. BONIOL.

DIA ESTECO (1783)

Nobla estu la hom',
helpema kaj bona !
Ĉar tio sola
distingas lin
de ĉiuj vivuloj,
kiujn ni konas.

Vivu la nekonataj
superaj estuloj
kiujn ni elsentas !
Ilin similu la hom' !
Lia ekzemplo nin instruu
kredi je tiuj.

Ĉar nesentema
estas natur' :
lumas la suno
super bonaj kaj malbonaj,
kaj brilas al krimulo
kiel al plej bona hom'
la lun' kaj la steloj.

Vent', riveregoj,
hajlo kaj tondro
muĝante forvojas
kaj kaptas,
preterrapidante,
unu post la alia.

Tiel ankaŭ la fortun'
plandas inter l'amaso,
prenas jen la buklojn
de l'senkulpa knab',
jen ankaŭ la kalvan
verton de l'pekulo.

Laŭ leĝoj eternaj,
feraj kaj grandaj
ĉiuj ni devas
pleniri la cirklojn
de nia ekzisto.

Tutsola la hom'
kapablas al neeblo :
li distingas,
elektas kaj juĝas ;
daŭron al la moment'
havigi li povas.

Li sola rajtas
rekompenci la virtajn,
puni la kulpajn,
sanigi kaj savi,
prosperige kunligi
ĉion erare vagantan.

Kaj ni honoras
la senmortulojn,
kvazaŭ ili estus homoj
kaj agus grandasfere,
kiel agas la plej virtulo
aŭ agi volus etkampe.

La nobla hom'
helpema estu kaj bona !
Nelacigite li nasku,
kio servas kaj pravas,
por ni li estu modelo
de l'estuloj elsentataj !


Johan Wolfgang GOETHE

El la germana tradukis Guido Holz

POR VIA DISTRO

Nova problemo

Krucvortoj (proponitaj de C. Cavalié)



Horizontale :

1. — Rilata al iu monato.
2. — Ŝirmilo. — Prepozicio.
3. — Katbleki. — Simpatia inklino al iu.
4. — Stangoj fiksitaj laŭlonge de ŝtuparoj por sin apogi.
5. — Kredema homo.
6. — Ankaŭ ne. — En tia pozicio, oni estas principe, sur seĝo.
7. — Nombro, kiu entenas alian nombron en ĝusta kvanto. — Neoportuna. malagrabla.
8. — Senpeze, kvazaŭ flugetante. — Interjekcio esprimanta bedaŭron.
9. — Regulo, difinanta la kondiĉojn de objektoj tiel ke tiuj objektoj estu interŝanĝeblaj.
10. — Ĝi formas karesan derivaĵon. — Oriento.

Vertikale :

1. — Ĝi estigas malfacilaĵojn sur la ŝoseoj (nur radiko).
2. — Aro da iloj, da maŝinoj (nur radiko). — Sufikso.
3. — Fratino de la avo aŭ de la avino.
4. — Tia, ke ĝi estas bona por io. — La plej maleebla el ĉiuj metaloj.
5. — Iris internen. — En alta grado.
6. — Nomo de litero, kemia simbolo de la 42a elemento. — Penanta ne esti trafita de malfacilaĵoj.
7. — Duondire. — Finaĵo de la estonteco.
8. — Majonezo kun mustardo kaj aromherboj.
9. — Bronzo aŭ latuno, ekzemple. — Ĝi altigas la guston de la ŝafrostaĵo.

GRAVE

Pro la altiĝo de la preskostoj kaj sendkostoj la redakcia komitato de Kulturaj Kajeroj decidis aperigi la revuon nur kvarfoje dum la jaro 1984. Kompense la prezo de la abono restos neŝanĝita kaj la redakciantoj klopodos ankoraŭ pli riĉigi la enhavon de la revuo. Ni esperas, ke vi komprenos nian decidon kaj daŭre abonos kaj abonigos viajn amikojn. Dankon.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Post ESTI kaj IGI : ĉu **A** ? ĉu **E** ?

KUN subjekto, oni havas adjektivon **A** por esprimi kvaliton :

— tiu ekskurso estas danĝer**a**

— lia flegado iĝas urĝ**a**

SEN subjekto, oni havas adverbon **E** por esprimi impreson, kiun oni sentas :

— estas malhele en la ĉambro

— subite iĝis malvarme en la domo

RIM :

— la adjektivo akompanas la substantivon

— la adverbo akompanas la verbon

Ĉiu, laŭvice...



Ne kredebla ! ke nur kelkaj decibeloj tiom nervoze igas vin. Ne riproĉu ; ni la junuloj, nur perfektigis la tumultoj de via junaĝo, pri kiuj vi tiom fanfaronis !

Manĝi estas manĝi !



Por mi estos angla supo, tranĉaĵon de pasteĉo en krusto, kradrostita bifstekon, kafo, konjako, kaj tomatoj tre maturajn.

Ĉu ŝparemo ?



Certe bele estas tiu ellaboraĵo ; ci estis tre atenta kaj pacienca ĉion enmetis en la botelo. Bedaŭrinde la botelo estas deponita ; ci devas ĝin malplenigi, por ke mi ricevu unu frankon.

CERBUMU

Ĉiu teksto, sub la bildoj, entenas **tri erarojn.** Trovu ilin, kaj **nur poste** legu la solvojn ĉi-sube :

— Kredeble, nervoza, tumultojn

— tranĉajo, bifsteko, maturaj

— bela, pacience, botelon

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (975 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (24 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 6 de 1983, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le Conseil d'Administration s'est réuni le 23 octobre et, comme toujours à ce moment de l'année, il a entendu le compte rendu des stages passés et l'état au 15 octobre des finances. L'ensemble est assez satisfaisant malgré l'insuffisante participation pendant le 3e stage.

Le Conseil d'Administration a également mis au point le calendrier des activités pour 1984 et le contenu des stages. La répartition de ceux-ci dans le temps est la même qu'en 1983 et le contenu des stages n'a guère changé exception faite de quelques modifications apportées à la structure du 3e stage. La remarque a été faite qu'il était difficile, au cours d'une journée dont les sujets de discussion sont divers, de décider de modifications importantes du calendrier et du contenu des stages de l'année suivante. Cela demande en effet une longue réflexion même si la Maison « marche bien ». Il a donc été décidé que les membres du Conseil d'Administration et les conseillers techniques feraient leurs remarques et des propositions sur d'éventuelles modifications concernant les stages de 1985, sous forme écrite, au président qui fera une synthèse. Ce sera donc de propositions concrètes que le Conseil d'Administration aura à discuter en octobre 1984. J'en profite pour rappeler cette décision et insister pour que les propositions me parviennent au plus tard fin mars 1984.

Un petit changement a cependant été apporté à l'enchainement des stages. Depuis plusieurs années une journée, à la fin de chaque stage, était réservée au nettoyage des chambres avant le début du stage suivant. Après calcul il est apparu qu'il valait mieux doubler le personnel les jours de départ qui seront aussi ceux d'arrivée. Il sera alors demandé aux personnes ne partant que l'après-midi de libérer leur chambre dans la matinée.

Les travaux nécessaires ou faisant partie d'un ensemble de rénovation ou de modernisation ont été décidés. Le modèle de photocopieur choisi par le Conseil d'Administration permet le tirage sur format A3, sur papier ordinaire bien entendu. Cela donnera de plus grandes possibilités d'utilisation mais le prix était supérieur à la somme reçue pour cet achat. C'est pourquoi la « Fonduso Fotokopiilo » n'est pas close et nous continuons à accepter des dons sur ce chapitre. De même nous avons l'intention de planter cette année encore quelques arbres fruitiers ou d'ornement. Nous utiliserons pour cela la petite somme qui reste et les sommes à venir.

Les programmes sont prêts, à votre disposition. Le nombre des inscriptions est déjà important pour cette époque de l'année (j'écris ces lignes fin novembre). Alors n'attendez pas trop longtemps.

P. BABIN.

INTER NI

La Administrantaro de la Kultur-Domo kunvenis la 23-an de oktobro, kaj aŭskultis la raportojn pri la pasintaj someraj staĝoj. Kvankam la partoprenantoj ne estis sufiĉe nombraj en Aŭgusto la situacio estas bona.

La Administrantaro ankaŭ preparis la kalendaron de la aktivaĵoj por 1984. Tiu kalendaro estas la sama, kiel en 1983 kaj la diversaj programeroj ne multe ŝanĝiĝis, krom pro kelkaj modifoj de la strukturo de la 3-a periodo. Fakte, estas malfacile decidi gravajn ŝanĝojn okaze de kunveno, kies diskut- temoj estas tre diversaj. Estis do decidite, ke la administrantoj kaj la teknikaj konsilantoj devos fari rimarkojn kaj proponojn pri la someraj staĝoj de 1985 jam antaŭ Pasko 1984. Tiamaniere estos eble fari sintezon kaj skribe interŝanĝi ideojn antaŭ la kunveno de oktobro 1984.

Eta ŝanĝo tamen aperas en la sinsekvo de la staĝoj. Jam de pluraj jaroj la foriro de la partoprenintoj kaj al alveno de la partoprenontoj ne okazis la saman tagon. Tiu sistemo okazigis iom grandan enspezoperdon. Estis decidite, ke foriroj kaj alvenoj okazos samtage. Tio devigos la personojn kiuj intencos foriri nur posttagmeze tamen liberigi sian ĉambron matene.

La diversaj laboroj necesaj estis deciditaj. La fotokopiilo estis elektita. Ĝi estas iom pli granda ol antaŭ- vidite kaj donos pli da laboreblecojn. La prezo estas pli alta ol la sumo disponigita de la diversaj donacintoj. Pro tio la « Fonduso Fotokopiilo » daŭre vivas kaj akceptas donacojn ĝis atingo de la elspezita sumo. Ankaŭ la « Fonduso Arboj » pluvivas ĉar la ĝardeno kaj la parko estas pretaj akcepti novajn arbojn.

Jam nun, fine de novembro, multaj aliĝoj estas registritaj. Do, petu de ni la programon kaj ne tro prokrastu vian decidon viziti Gresillon en 1984.

APPEL A CANDIDATURES

En 1984, la moitié du Conseil d'Administration sera renouvelable (soit 6 membres). Tous les membres sortants ne se représentant pas nous insistons pour que se fassent connaitre de nouveaux candidats. Envoyer les candidatures au président (13, bd de la Chauvinière, 44300 Nantes) avant le **31 janvier 1984.**

REUNION DU CONSEIL D'ADMINISTRATION DU 23 OCTOBRE 1983

Le Conseil d'Administration s'est réuni à Grésillon le 23 octobre 1983, à 10 heures.

Etaient présents : Mmes Cheverry, Micard, Vincent, MM. D. Babin, P. Babin, Bénistant, F. Boyet, H. Boyet, Bodereau, Dairon, Guillot, Métivier.

S'étaient excusés : Mmes Mathé, Prévot, MM. Lemagadure, Lloancy.

SEJOURS 1983

Le passage des « Fervojistoj » a réuni entre 50 et 60 personnes.

Premier séjour

Ce séjour, qui s'est déroulé du 2 au 21 juillet, comportait des conférences et des cours. Les conférences ont été bien suivies. L'hétérogénéité de niveau a posé quelques problèmes pour le cours de 2e degré. Le nombre moyen de personnes présentes par jour a été de 77. On note une légère diminution de la moyenne d'âge des participants à ce séjour (44,7 ans au lieu de 55 ans en 82).

Deuxième séjour

Il a été consacré essentiellement à des cours dirigés par Mme Childs-Mee pour le premier degré, par M. R. Lloancy pour le deuxième degré, et par M. P. Babin pour le troisième degré. Ces cours ont été bien suivis et d'un bon niveau. Le nombre moyen de personnes présentes par jour a été de 83, pour une moyenne d'âge de 37,2 ans.

Stage L.F. Koop

Les participants étaient surtout des personnes du stage précédent ou du stage qui suivait.

Troisième séjour

Ce séjour était axé sur les activités manuelles. Il a réuni très peu de participants (le nombre moyen de personnes présentes par jour était de 41). Ce fut un séjour très homogène et très sympathique, mais trop court pour mener à bien la réalisation des objets proposés. La question est posée de savoir si une telle formule permet effectivement d'apprendre la langue.

Quatrième séjour

Ce séjour était organisé par F.U.B.E.. Il a réuni pour moitié des non-voyant, et pour moitié des voyants. Ce fut un stage très intéressant, souvent de haut niveau et qui s'est déroulé à la satisfaction des participants. Le nombre moyen de personnes présentes par jour a été de 26.

Fonduso Belbona Espero

Il a été utilisé pour permettre le séjour de deux personnes, une polonaise et une hongroise.

Caractéristiques générales de la saison 1983

Le nombre total de personnes ayant séjourné à la M.C.E. en 83 est de 307. Ce nombre est tout à fait comparable à ceux des années précédentes : 316 en 81 et 330 en 82.

Entre chaque stage, une journée est réservée pour la remise en état du château (ménage, lits, etc...). Cette journée au cours de laquelle le nombre de participants est très faible conduit à des pertes de rentrées financières et diminue d'autant la durée des cours. Il serait donc préférable de supprimer ce jour de battement.

SEJOURS 1984

Printemps

Du 1er au 7 avril. Rencontre internationale d'enfants dirigés par F. Lemagadure.

Eté

Premier séjour

Il se déroulera du 1er au 20 juillet et comportera des conférences et des cours. Mme Cheverry, MM. Roose, Rollinger, Métivier, F. Boyet ont donné leur accord pour assurer des conférences pendant ce séjour. Mlle Juanita Turbillon assurera un cours, ainsi que E. Ludwig.

Stage L.F. Koop

Il aura lieu du 20 au 22 juillet selon un programme qui ne nous est pas encore parvenu.

Deuxième séjour

Il comportera des cours des trois degrés et se déroulera du 22 juillet au 5 août. Mme Vincent assurera l'un de ces cours.

Troisième séjour

Du 5 août au 19 août. Toujours axé sur des activités manuelles. Un cours d'Esperanto aura lieu le matin et traitera surtout les erreurs de grammaire les plus fréquentes.

Quatrième séjour

Il sera à nouveau, organisé par F.U.B.E.

Responsables des séjours

L'équipe des responsables des stages sera constituée de Mmes Lenel, Leriche, M. et Mme P. Babin, M. D. Babin.

Prix pour l'année 1984

Le droit d'inscription est inchangé et s'élève à 100 frs pour deux ou trois semaines.

Les tarifs de pension journalière sont :

Chambre à 1 lit	132 frs
Chambre familiale	110 frs
Chambre commune	96 frs
Campeurs	90 frs

Les enfants de 1 à 6 ans bénéficient d'une réduction de 50 % sur le tarif « chambre commune ».

Seuls les enfants de plus de 12 ans seront acceptés en chambre commune.

Le prix d'un repas pris au château par une personne de passage est fixé à 40 frs (boisson non comprise).

Aperçu financier de la saison 1983

Les recettes « séjours » sont en hausse par rapport à l'année dernière, et les dépenses sont en légère baisse. Cette baisse des dépenses est due, principalement, à une diminution du nombre de salaires versés. En conséquence, le compte « séjours » présente un excédent de l'ordre de 40 000 frs. Le montant global des dons est en baisse (20 000 frs au lieu de 50 000 frs en 1982).

Le compte « librairie » est satisfaisant. Le compte « souvenirs » est identique à celui de l'an dernier.

Il a été possible de faire 90 000 frs d'investissements, comme l'année dernière. Les liquidités disponibles provisoirement s'élèvent à 120 000 frs.

Photocopieur

Le fond « photocopieur » s'élève à 11 000 frs. Un photocopieur sera acheté en format A3.

TRAVAUX

— Réfection de la chambre 35.

— Remise en état de l'électricité dans les deux salles à manger.

— Le plafond de la salle à manger « du fond » devra être refait.

— Il est nécessaire de refaire la porte de la chaufferie, et de construire une porte devant le ballon d'eau chaude.

— La réalisation d'une série de diapositives sur la vie à la M.C.E. sera envisagée pour l'an prochain.

— Les piliers de l'entrée de la propriété, sur la route, devront également être refaits.

— Les bacs de décantations d'évacuation de la cuisine seront refaits et déplacés.

Problème du jardinier

Le jardinier est en arrêt de travail, et il semble qu'il ne puisse pas reprendre son travail. L'élagage de la propriété sera réalisé par un bûcheron en fonction des besoins. Le problème du remplacement du jardinier devrait se poser assez prochainement.

Le secrétaire de séance
Jean-Paul GUILLOT.

IMPORTANT

Les frais d'impression et d'envoi de Kulturaj Kajeroj étant plus élevés que le montant des abonnements perçus, les responsables se sont trouvés devant le dilemne : ou supprimer la revue ou trouver un moyen de compenser l'écart entre recettes et dépenses. La première solution leur semblant impensable ils ont cependant refusé d'augmenter le prix de l'abonnement. La solution provisoire, nous l'espérons, qui a été retenue est de ne faire paraitre que quatre numéros en 1984 au lieu de cinq. Nous espérons que nos lecteurs, dont le nombre doit absolument croitre, comprendront que c'était là le moyen de conserver ce lien culturel entre eux et nous. Nous nous efforcerons d'améliorer encore la richesse et l'attrait du contenu de Kulturaj Kajeroj trimestriel.

NOS COURS
PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue.
Cours et corrections : 100,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entrainement à un cours supérieur : versions thèmes, étude de textes.
Cours et corrections : 70,00 F.
Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà. ★

Régler les cours par un chèque à part
C.C.P. : 1485 39 P Nantes

Les extraits de notre catalogue

UNU aù NUL

de Guy Marchand

LES BASES
DU MONDIALISME

Prix de l'exemplaire : **15 francs**